## ENHAVO

pağo


Enkondukaj vortoj . . . . . . . . . . . . . . . . . . 81

La kosto antaŭas la profiton. — *G. F. Makkink* . . . . . . . . 82

Nunaj problemoj de birdomigrado: orientado de birdoj. — *Marija Kozamernik* . . . . . . . . . . . . . . . 86

Migrado de kukolo. — *W. De Smet* . . . . . . . . . . . 90

Pezosento kaj spirado dum interplaneda vojaĝo. — *B. Popović* . . 91

La disvastigiteco de ŝakalo. — *Franjo Nikolić* . . . . . . . . 106

Sciencaj, teknikaj kaj ceteraj fakvortaroj en Esperanto. — *R. Haferkon* . . . . . . . . . . . . . . . . . 111

La muzeo de la naturo. — *N. Smirnov* . . . . . . . . . . . 129

Junaj Astronomoj-Esperantistoj: Tragedio en la Universo. — *J. Régulo Pérez* . . . . . . . . . . . . . . . . 129

Marjorie Boulton: Zamenhof, Creator of Esperanto. — *W. P. R.* . . 132

La Unua Internacia Konferenco Esperanta de Sciencistoj. — *Paul Neergaard* . . . . . . . . . . . . . . . . 133

Primošten vokas! . . . . . . . . . . . . . . . . . 136


**REDAKTOROJ DE ESPERANTAJ GAZETOJ!**

Dediĉu al tiu ĉi duobla kajero almenaŭ kelkajn liniojn en via gazeto, substrekante precipe aboneblojn por viaj samlandanoj (utiligu la informojn presitajn sur la kovrilo!).


**Redakta Komitato:** D-ro A. Albault, M. Ĝivoje, Prof. J. Görlich, D-ro P. Neergaard, Prof. S. Reiersöl, C. Stöp-Bowitz. **Ĉefredaktoro** M. Ĝivoje, Gornji trg 31/II, Ljubljana 13, pf. 18, Jugoslavio (prizorgas ankaŭ la administradon). **Respondeca redaktoro** (Odgovorni urednik): Prof. B. Popović, Zagrebačka 24, Sarajevo, Jugoslavio

Presis: Željeznička tiskara, Zagreb, Petrinjska 87




# SCIENCA REVUO


Eldono de INTERNACIA SCIENCA ASOCIO ESPERANTISTA

Aperas kvarfoje jare. Jarabono 30 steloj = 7.5 Ned. gld. = 2,2 $ = 1500 Din.

Por membroj de I.S.A.E. la jarabono 25 steloj (la jarkotizo 10 steloj)

La abonojn kolektas la landaj delegitoj de ISAE (La listo troviĝas sur la lasta kovrilpaĝo)


## ENKONDUKAJ VORTOJ

LAŬ la informo presita en la pasinta numero de nia revuo, la 12-a volumo devis aperi komplete en Nederlando ĉe J. Muusses kaj sub la redaktoreco de W. R. Roelofs, kaj ekde la vol. 13-a la revuo aperi en Jugoslavio sub la redaktoreco de Marinko Ĝivoje. Kiam ni jam transdonis la manuskripton por la n-ro 1 de vol. 13 al la presejo en Zagreb kaj kiam ĝi jam estis kompostita, atingis nin informo el Nederlando ke la pres-pretigitan manuskripton por n-ro 3—4 de vol. 12 ne estas eble presi ĉe la ĝisnuna eldonisto. La tuta manuskriptaro estis al ni sendita el Nederlando. Por gajni tempon ni simple alibaptis n-ron 1. de vol. 13-a al n-ro 3—4 de vol. 12-a, aldonante, memkompreneble, kelkajn neprokrasteblajn artikolojn por atingi dezirindan amplekson por duobla numero.

Ĉar tiu ĉi numero estas daŭrigo de la antaŭa, ni klopodis imiti laŭ niaj ebloj la eksteran aspekton de ĝia antaŭulo.

Ni esperas, ke la »Scienca Revuo« post la lastatempa halto suriros la vojon de regula aperado, sed por tion atingi estas du antaŭkondiĉoj:

1. ke la kunlaborantoj sendu enhave kaj precipe lingve taŭgajn artikolojn, kiuj estu tajpitaj kun interlinio;

2. ke la abonantoj reabonu la revuon kaj kune kun niaj perantoj klopodu varbi novajn abonantojn.

Je la fino ni esprimas elkoran dankon al la ĝisnunaj eldonisto, administranto kaj redaktoroj, precipe al la meritplena triopo J. Muusses, W. P. Roelofs kaj G. F. Makkink, kiuj dum 12 jaroj portis sur siaj dorsoj la ŝarĝon de S.R. Iliaj meritoj estas ja pli ol grandaj.